




Evangeliiistoj



kaj iliaj atributoj



KELI

Kristana Esperantista Ligo Internacia
fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA

Celo: Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.

Prezidanto: Philippe COUSSON

✉ 26 rue de Pré-Ventenet,
FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;
☎ +33 (0) 549468021; ✉ keli@chez.com

Sekretario: Pavel POLNICKÝ;

✉ Lidická 939/11,
CZ 290 01 Poděbrady, Ĉeĥio
☎ +420 723 672 335;
✉ polnickypavel@seznam.cz

Kasisto: Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS

✉ Klauzál utca 32,
HU 1072 Budapest, Hungario
☎ +36 302 000 306;
✉ agnes@raczkevy-eotvos.com

Kotizoj: Rekta membro kun gazeto, minimume €20,- • Membro-subtenanto €30,- • Nura abono: pagante rekte al KELI €16,- • pagante al Libroservo €18,- • Sendoj de okcidentaj monbiletoj per registrita letero al la kasisto de KELI. •

Se estas en via lando UEA-poŝtĵirkonto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu prefere pagi al UEA por konto **kelk-p** de KELI • Franca bankkonto de 'KELI Ligue Chrétienne Espérantiste Internationale':

CIC-banko, BIC: CMCIFRPP;
IBAN: FR76 1009 6182 4800 0368 7480 104

Vizitu ankaŭ la ttt-paĝon www.chez.com/keli/

DIA REGNO

Oficiala organo de KELI, fondita en 1908
dumonata revuo - ISSN 0167-9554

Redaktoro: Bengt Olof ÅRADSSON

✉ Kungsgatan 13B; SE-281 48 Hässleholm; Svedio
☎ +46 70 2004574; ✉ dr_boarad@yahoo.se

Kontrollegis: Pavel POLNICKÝ

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la kasisto de KELI (vidu supre).

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ traduko oni sendu al la redaktoro.

Ekspedado: Pavel POLNICKÝ

Vidu la adreson de la sekretario

Presado: Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady,
Ĉeĥio

✉ info@astroprint.cz

Eldonmonatoj: meze de feb, apr, jun, sep, okt, dec.

Enhavo

Dum izolado	51
Haltu!	53
Evangeliistoj kaj iliaj atributoj	54
La historio pri la Sep Dormantoj de Ezezo	58
Nova kaj viva vojo estas inaŭgurita	62
Spuroj sur la sablo	63
Financaj raportoj kun klarigoj	64
Tagordo por la jarkunveno 2020	68
Festmanĝo kun sopranulino	69
Kronviruso, Kovim-19 kaj ni!	70
Ho Di!, ho bona Di'	72

Redaktoraj vortoj

Kara leganto, en pasinta numero de Dia Regno mi skribis ke “stranga kaj malfacila estas la nuna tempo pro la pandemio” kaj bedaŭrinde la situacio ne multe pliboniĝis, kvankam pluraj landoj provas iom malfermi la socion denove. Diversmaniere kaj diversforte la pandemio frapas nin. Kelkaj legantoj raportas mallonge pri sia situacio en la nuna Dia Regno. Interese estas legi ke kelkaj povas utiligi la nunan situacion por fari aĵojn, al kiuj oni antaŭe ne trovis tempon. Eble ankaŭ vi sendu raporteton pri via situacio al la sekvonta numero!

Kiam la nuna numero pretiĝas, la estraro ankoraŭ ne decidis pri la kongreso ĉi-jara, en Pollando, ĉu eblos kongresi aŭ ne? Ni daŭre esperas. Estos granda manko se ne okazos.

Eble mi ne ĉiu-foje petas kontribuojn kaj tekstojn al Dia Regno. Tio ne signifas ke ne estas bezono. Mi jam nun dankas pro estonta granda enfluo. :-)

Mi deziras al vi interesan legadon.

Dum izolado

Surreta prediko la 26an de aprilo

Philippe Cousson, FR

Kaj jen du el ili iris en tiu sama tago al vilaĝo nomata Emaus, kiu estas malproksime de Jerusalemo sesdek stadiojn. Kaj ili interparolis inter si pri ĉio tio, kio okazis. Kaj dum ili interparolis kaj diskutis inter si, Jesuo mem alproksimiĝis kaj iris kun ili. Sed iliaj okuloj estis malhelpataj tiel, ke ili lin ne rekonis. Kaj li diris al ili: Kiaj vortoj estas tiuj, kiujn vi interŝanĝas, dum vi iras? Kaj ili haltis, kun malgaja mieno. Kaj unu el ili, nomata Kleopas, responde diris al li: Ĉu nur vi sola loĝas en Jerusalemo, kaj ne scias tion, kio tie okazis en ĉi tiuj tagoj? Kaj li diris al ili: Kion? Kaj ili diris al li: Pri Jesuo, la Nazaretano, kiu estis profeto potenca age kaj parole antaŭ Dio kaj la tuta popolo; kaj kiel la ĉefpastroj kaj niaj regantoj transdonis lin por kondamno al morto, kaj lin krucumis. Sed ni esperis, ke li estas tiu, kiu elaçetos Izraelon. Kaj plie, krom ĉio tio, hodiaŭ estas jam la tria tago, de kiam tio okazis. Ankaŭ miriĝis nin iuj virinoj el inter ni, kiuj estis frumatene apud la tombo, kaj ne trovinte lian korpon, revenis, dirante, ke ili ankaŭ vidis vizion de anĝeloj, kiuj diris, ke li vivas. Kaj iuj el nia kunularo iris al la tombo, kaj trovis tiel, kiel diris la virinoj; sed lin ili ne vidis. Kaj li diris al ili: Ho malsaĝuloj kaj kore malviglaj por kredi ĉion, kion la profetoj antaŭparolis! Ĉu la Kristo ne devis suferi ĉion tion, kaj eniri en sian glorion? Kaj komencante de Moseo kaj de ĉiuj profetoj, li klarigis al ili el ĉiuj Skriboj la dirojn pri li mem. Kaj ili alproksimiĝis al la vilaĝo, kien ili iris, kaj li ŝajnis al ili, kvazaŭ li plueniros. Kaj ili retenis lin, dirante: Restu ĉe ni, ĉar estas preskaŭ vespere, kaj la tago jam malkreskas. Kaj li eniris, por resti ĉe ili. Kaj dum li sidis kun ili ĉe manĝo, li prenis panon, kaj ĝin benis kaj dispecigis kaj donis al ili. Kaj iliaj okuloj malfermiĝis, kaj ili rekonis lin, kaj li fariĝis nevidebla por ili. Kaj ili diris unu al alia: Ĉu nia koro ne brulis en ni, dum li parolis kun ni sur la vojo, dum li klarigis al ni la Skribojn? Kaj leviginte en tiu sama horo, ili reiris al Jerusalemo, kaj trovis la dek unu kunvenintaj, kun siaj kunuloj, kaj dirantaj: La Sinjoro vere levigis, kaj aperis al Simon. Kaj ili rakontis tion, kio okazis sur la vojo, kaj kiamaniere li rekonigis al ili en la dispecigo de pano.

Luko 24:13-35

Karaj gefratoj, vi certe ĉiuj konas ĉi tiun rakonton, pri tiuj du disĉiploj kiuj post la krucigo de Jesuo reiris al sia hejmo. Mi volas atentigi vin, ke plej verŝajne, male al la tradicia interpreto, ne temas pri du viroj sed pri geedza paro, kiu akceptis Jesuon en sia domo, en sia hejmo.

Ĉu, ni en tiu ĉi speciala periodo, kiun ni vivas, ni invitas Jesuon en nian domon, nian hejmon? Ĉu estas por li loko?

Por resumi, tiu paro revenas hejmen diskutante dum la vojo. Iu alvenas kaj kunvojaĝas kaj kundiskutas. Ili firme invitas lin resti ĉe ili. Dum la manĝo ili rekonas Jesuon kiu tuj malaperas. Ili tiam reiras al la urbo por raporti al la aliaj disĉiploj kion ili spertis.

En tiu teksto pluraj aspektoj aperas, kiujn mi prezentos: diskuto kaj parolo, okuloj kaj vidado, vojaĝo kaj vojo, la greka vorto *egeneto* [ἐγένετο], la releviĝo.

En ĉi tiu peco, oni multe parolas. Interese estas, ke en ĝi oni trovas la radikojn de la tri etapoj de la Bibliaj studado kaj meditado: *ekzegezo*, *hermeneŭtiko* kaj *homiletiko*. La du disĉiploj ĉi tie trapasis ĉiujn. En versikloj 14 kaj 15, nia traduko indikas ke ili interparolis. La vorto signifas ĉefe komercajn rilatojn, sed ankaŭ interparolojn. La nuna senco venas tra la latina kaj signifas *paroladon*. En versiklo 27 Jesuo klarigis la Skribojn, t.e. *interpretis* ilin. En versiklo 35, la disĉiploj rakontas, t.e. *klarigas*, prezentas la okazintaĵojn. Plie, la dua verbo de la versiklo 15 signifas pli ol simpla diskuto, oni povus diri disputis, interŝanĝis argumentojn.

Niaj disĉiploj, unue inter si kaj poste kun Jesuo parolis, interparolis, aŭskultis la parolojn de Jesuo kiu klarigis al ili la Skribojn. Tio, traserĉado kaj klarigo kaj interpreto de la Skriboj estas unu el la

ĉefaj taskoj de la Eklezio, kaj ankaŭ de ĉiu kristano.

Tamen, la efiko de tio ne dependas de la Eklezio, de la kristanoj mem, sed de Dio, de la Spirito. La teksto diras ke la okuloj de la disĉiploj estis malhelpataj vidi, t.e. ankaŭ kompreni.

Kiam li ne komprenas, blindulo diras kiel la vidantoj: “mi ne vidas”. La fino de la teksto indikas ke post la dispecigo de la pano, iliaj okuloj malfermiĝis. Tiam, ili komprenis ke Jesuo dum la vojo malfermis al ili la skribojn, kiel diras la versiklo 32. La esperanta versio diras “klarigis” sed la originalo estas “malfermis”. Por koni, rekoni la Sinjoron, oni bezonas malfermitajn okulojn, malfermitan menson. La menso de la du estis fermita. Ili ne eltrovis en la disputado inter si. Eĉ, reage al la demando de la kunvojaĝanto, ili haltis. Ili ne povis eliri el siaj blokadoj, el siaj unuaj esperoj, el siaj komprenoj. Ili rigardis al la malĝusta loko. Tial, Jesuo diris al ili ke ili estas malsaĝuloj kaj kore malvigluloj.

Tiu kiu restas staranta je sia propra pensosistemo ne povas akcepti ion el aliloke kaj rondiras nenien.

La teksto tamen pli taŭgas por kino ol por foto. Ili preskaŭ ĉiam moviĝas. La du vojaĝas hejmen el Jerusalemo. Jesuo kunvojaĝas. Alveninte, Jesuo planis pluri. Tuj post la malapero de Jesuo, ili reiris al la urbo. La parolo de Dio aŭdiĝas dumvoje, dumvojaĝe, dum movo. Kutima diro estas: kiu ne antaŭeniras malantaŭeniras. Kiu ne iras el sia komforto, el sia loko, iras nenien. Oni povas kompreni la Vorton de Dio nur moviĝante, sur la vojo.

Mi ĵus diris, ke oni bezonas aliecon, alian voĉon, malfermiĝi, malfermiĝi al la Skriboj, malfermiĝi al la Spirito, al la parolo de Jesuo.

Kvarfoje en tiu teksto troviĝas la greka vorto *egeneto*. Nia esperanta versio ne redonis tion. Ĉiufoje, tiu vorto rilatas al Jesuo. Ĝi signifas ion kiel “okazis”.

Okazis, ke kiam ili interdiskutis Jesuo alproksimiĝis.

Okazis en Jerusalemo ĉi tiuj aferoj pri Jesuo, ke li mortis.

Okazis ĉe la tablo ke li prenis panon.

Okazis ke li fariĝis nevidebla. Jesuo intervenis en ilian vivon. Ili parolis pri Jesuo, kaj okazis ke li estis tie.

Okazis ke la potenca profeto kiu mortis komentis al ili Moseon kaj la profetojn Ili aŭdis la klarigon de la Skriboj, kaj okazis ke li dispecigis la panon post la beno.

Okazis, ke kiam ne plu estis utila la vidado li malaperis, li fariĝis nevidebla. Kiam unu aŭ du estas kune, Li estas inter ili. Kio okazis al tiuj du disĉiploj ne estas nur la malfermiĝo de la okuloj kaj de la fido, sed ilia releviĝo. Kiam la teksto parolas pri Jesuo, ĝi diras le li estas vivanta, ke li vekigis. Sed pri la disĉiploj, en versiklo 33, la teksto diras ke ili leviĝis, releviĝis. Multaj inter ni estas dum tiu ĉi tempo blokataj en la domo. Vojaĝo fizika ne plu eblas. Sed tio ne malpermesas al ni vojaĝi kun Jesuo laŭ la Skriboj, studante ilin, aŭskultante ilin. Kiam eblas, ni povos leviĝi, kaj iri por atesti pri lia ĉeesto, pri lia kunesto, pri lia akompano en restado kaj en movo.

Amen.

Artikolo de la 1a de decembro 1963

József Farkas, hungara reformita pastoro (1914–1999)

Tradukis Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS, HU

Haltu, ni unu minuton je la frazo, kiun ni legis en la libro de la bonfama svisa nerv-doktoro Paul Tournier: “Nuntempe la homoj pro siaj animaj problemoj pli volonte iras al nerv-doktoroj ol al pastoroj, ĉar ili timas – kaŭze? senkaŭze? ni ne decidu nun – ke la pastoroj juĝos pri ili. Ili ne timas pri la nerv-doktoroj. Laŭ la ĝenerala pensmaniero la doktoroj agas neŭtrale: ili ne okupiĝas pri moralaj aferoj, ili simple volas kompreni la agadon de la homoj, ĉirkaŭ tiel, kiel la astronomo volas kompreni la vojon de la steloj.

Ni haltu je tiu ĉi demando kaj ni rigardu profunden. Unue – bedaŭrinde – ni devas larĝigi la rondon. Certe ne ĉiuj pastoroj juĝas pri la “kulpantoj”, sed preskaŭ ĉiuj “kredantoj” multe ŝatas juĝi aliajn homojn. Kio estas malantaŭ tiu ĉi komuna agado? Ni kondiĉu nun la eble plej bonon: tiu konvinko vivas en la profundeco de la kredanta animo, ke Dio komisiis la altvaloran trezoron de la kredo kaj moralo al la eklezio. Kaj oni devas gardi ilin. La moralajn normojn oni ne kovru, oni devas demonstri kaj se iu kulpas, agas kontraŭ ili, tiun pekon devas malkaŝi. Estas ankaŭ pedagogiaj esperoj malantaŭ tiu ĉi agado: tiel eblas eduki la homojn, se ni malkaŝe montras iliajn pekojn, ni klarigas, kiaj pezaj estas tiuj pekoj, kaj ni precize difinas, kia morala rekompenco aŭ memvola sufero

bezonas en la alian pesilplaton de la pesilo, ke la vundita mond-ordo refariĝu. Se ni faras tion forte kaj konsekvente, tiam la homoj certe neos, rifuzos siajn antaŭajn pekojn, kulpojn kaj agos bone.

La rezulto de psikologiaj esploroj malkonfirmas tiujn ĉi esperojn. Malkovriĝis, ke ankaŭ sen nia morala etiko vekigatas en ĉiuj homoj kulposcio kaj pento. Sed plej ofte ne je tiuj punktoj, kie ni kutimas kulpigi ilin. Se ni estas perfortemaj kun ili, kaj ni volas ke ili akceptu nian propran moralan verdikton, regule okazas tio, ke ili kontraŭstaras niajn pensojn. Multfoje ili eĉ kontraŭatakas, aŭ almenaŭ kolere atestas sian agadon kontraŭ niaj akuzoj, kaj dumtempe ilia kulposcio, kiu ekvekigatas, tute paliĝas.

Stranga estas tiu ĉi reguleco: se ni ne juĝas ilin, tiam pli-malpli frue ili juĝas sin mem. Se ni komencas perforteme agi kaj juĝi, ili malmoliĝas kaj turnas sin kontraŭ ni: ankaŭ ili komencas juĝi nin. Kia “moderna” estis Jesuo: Li ne juĝis la kulpantojn, eĉ defendis ilin kontraŭ la atakoj de la farizeoj. Kaj tute kompreneble la homoj multnombre iris al Li, al la “doktoro”, kaj ne al la tiatempaj pastoroj, kiuj povis nur juĝi. La farizeoj tuj nomis Jesuon amiko de la kulpantoj, kvankam li ne estis la kunkrimulo de iu ajn kulpanto. Li agis kiel doktoro: en la etoso de lia komprenema amo estis ebla,

ke en interno, en la profundece de la animo, libere naskiĝu la kulposento. Li ne per skurĝo de ekstere batis en la animon tion, ke vi estas kulpanto.

Nia misio ne estas postuli la moralajn normojn de la homaro, sed montri la pardondonan amon de Dio. Ĉu finfine ni

kredas, ke se ni predikas pri la malnovaj bonaj normoj, ni gajnas malpli, ol se ni disigas la ĝojon de la pekpardono?

Se Dio per amo proksimiĝas al la kulpantoj, kial ni kristanoj ofte estas senindulgaj, kruelaj kun ili?

☪

Evangeliiistoj kaj iliaj atributoj

Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS, HU

Ni preparolis la atributojn de la apostoloj en la antaŭaj artikoloj. Eblas, ke kiam vi legis, ke la atributo de Johano estas la kaliko, aŭ ke la atributo de Mateo estas la monburso, vi pensis, ke vi vidis Johanon kun aŭ kiel aglo, kaj Mateon kiel anĝelo – kiel eblas?


La kaŭzo estas simpla: Johano kaj Mateo ne estas “nur” apostoloj, ili estas ankaŭ evangeliiistoj.

La kvar evangeliiistoj ne havas simbolon en la Biblio, sed estas interese, kiel elformiĝis la kulto kaj la ikonografia tradicio de la atributoj de la evangeliiistoj.

En la mezepoko la homoj ne bone konis la Biblion, la historiojn de la Biblio ili ne rekte el la Sankta Skribaĵo konis, plejparte ĉar malmultaj homoj povis legi kaj la libroj estis tre multekostaj.



La kvar evangeliiistaj simboloj. Parma, Italio



Mateo

Okcidente la legadon anstataŭigis la eklezia tradicio, la roma instrua oficejo kreditigis kaj apogis ĝin. Kvankam partojn oni legis el la Biblio kaj ilin klarigis, multajn versiklojn neniam aŭdis la simpluloj. La pastroj plej ofte klarigis la versiklojn per alegorio kaj tipologio.

El la metodo de alegorio elkreskis perfortema eksplikado, el la metodo de tipologio la agado, ke oni simplige kaj ofte tute false trovu paralelecojn.

Tiel “renkontiĝis”, el la fama vizio de la profeto Jeĥezkel, la kvar kapoj kun la kvar aŭtoroj de la kvar evangelioj.

Tute nenia simileco aŭ kontakto estas inter la kapoj en la vizio kaj la evangeliistoj – nur la sama nombro ‘kvar’ kaŭzis, ke oni “kunigis” ilin.

Ni legas ĉe Jeĥezkel (1, 4-10):


Kaj mi vidis, jen malkvieta vento venis el la nordo kun granda nubo kaj flamanta fajro; brilo estis ĉirkaŭe de ĝi, kaj el interne, el la mezo de la fajro, iris tre hela lumo. El la mezo vidiĝis bildo de kvar kreitaĵoj, kaj ilia aspekto estis kiel aspekto de homo. Kaj ĉiu havis kvar vizaĝojn, kaj ĉiu el ili havis kvar flugilojn. Iliaj piedoj estis piedoj rektaj, kaj la plandoj de iliaj piedoj estis kiel plando de bovido kaj brilis kiel hela pura kupro. Kaj homaj manoj estis sub iliaj flugiloj ĉe iliaj kvar flankoj; [ĉiuj kvar havis siajn vizaĝojn kaj siajn flugilojn.] Iliaj flugiloj estis kuntuŝiĝantaj unu kun la alia; irante, ili sin ne deturnadis, sed ĉiu iradis laŭ la direkto de sia vizaĝo. La aspekto de iliaj vizaĝoj estis kiel vizaĝo homa, kaj kiel vizaĝo leona sur la dekstra flanko de ĉiuj kvar, kiel vizaĝo bova sur la maldekstra flanko de ĉiuj kvar, kaj kiel vizaĝo agla ĉe ĉiuj kvar.



Mateo



Marko



Johano

Do, ili sukcesis trovi la nombron kvar en la malnova testamento, sed kiel kunigi la kvar kapojn en tiu ĉi vizio (homo, leono, bovo, aglo) kun la kvar evangeliistoj?

Oni ĉarman klarigon trovis: tiel, kiel komenciĝas la evangelioj!

Mateo komencas sian evangelion per la deveno kaj naskiĝo de Jesuo, do li akcentas, ke Jesuo estis homo – estu la atributo de Mateo la homo aŭ la vira anĝelo!

Je la komenco de sia evangelio *Marko* skribas pri la predikado de Johano, kiu okazas en la dezerto, kaj la simbolo de la stepo estas la leono – do estu la atributo de Marko la leono!

La evangelio de *Luko* komenciĝas per la incens-ofero de Zaĥario, kaj la ofer-besto estis bovo – do estu la atributo de Luko la bovo!

Kaj fine, je la komenco de lia evangelio, tiel leviĝas la animo de *Johano* kiel aglo al la sekreto de la dia origino de Jesuo – do estu la atributo de Johano la aglo!

Luko

Laŭ la kristana tradicio li estas la verkanto de la tria evangelio kaj La Agoj. Li naskiĝis en Antioĥio en Sirio. Malmulte ni scias pri lia vivo, sed en la Letero al Koloseanoj Paŭlo skribis pri li, ke li estas “la amata kuracisto”, do ni povas supozi, ke li estis kuracisto.


Li neniam renkontiĝis kun Jesuo. Apostolo Paŭlo konvertis lin, kaj Luko akompanis lin dum liaj apostolaj vojaĝoj, kaj estis apud li ankaŭ en la plej malfacilaj tempoj.



Marko



Johano



Luko

Sankta Johano en Baziliko de Sankta Johano en Laterano; Giuseppe Mazzuoli (1644-1725)

Skulptaĵo sur la Sankta Stefano baziliko en Budapeŝt

Post la mortoj de Petro kaj Paŭlo li iris al Italio, Gallio, Dalmatio, Make-donio. Laŭ aliaj fontoj li instruis en Egiptio, Libio kaj Tebo.

Kiam li estas 84 jaraĝa, en Beotio (nuna Grekio) li mortis, laŭ kelkaj la martiran morton.

Marko

Li estis judo, origine lia nomo estis Johanan, sed li ne inter judoj faris sian konvertan laboron, kaj pro tio li estas pli konata per la latina nomo Marcus. La signifo de lia nomo estas “peza martelo”.

Onidire li pro tio ricevis tiun ĉi nomon, ĉar tiel li formis la homojn, kiel la peza martelo formas la varmegan feron.

Estas opinioj, ke li estis unu el la 72 disĉiploj, kaj estas opinioj, ke li post la resurekto de Jesuo konvertiĝis.

Li estis la sekvulo kaj kunlaboristo de Petro jam ekde la jaro 45. Inter la jaroj 50 kaj 60 li notis la predikojn de apostolo Petro kaj poste laŭ tiuj notoj li verkis sian evangelion.

Li devastigis la kristanisman en Egiption, li fondis la koptan ortodoksan eklezion, kies unua episkopo li estis. La paganaj pastroj mortigis lin. ☩



Marko



Luko



Luko



Johano

La historio pri la Sep Dormantoj de Efezo

Jakobo de Voraĝino

El la latina tradukis Gerrit BERVELING, NL

Pri la persekutado de Decio, kiu grave influis la epokon, poste estiĝis pluraj rakontoj, anekdotoj aŭ legendoj. Unu el la plej famaj estas tiu pri la t. n. Sep dormantoj de Efezo (en nuntempa Turkio). La rakonton oni trovas i. a. en verko de Jakobo de Voraĝino (IACOBUS DE VORAGINE, ĉ. 1230–1298) – LEGENDA AUREA (Ora Legendo) kaj ankaŭ en la Korano 18:10-27.

La originala latina teksto: <http://www.thelatinlibrary.com/voragine/septem.shtml>

La sep dormantoj devenas el la urbo Efezo. Kiam imperiestro Decio, kiu persekutis la kristanojn, atingis Efezon, li konstruigis templojn meze de la urbo, por ke ĉiu kun li faru oferojn al la idoloj. Kiam li do igis kunserĉi ĉiujn kristanojn kaj devigis ilin – katenitajn – aŭ plenumi oferojn aŭ morti, ekestis sur ĉiuj tiom da timo pri puno, ke eĉ amiko neis amikon, kaj filon patro aŭ patron filo.

Tiam troviĝis en tiu urbo sep kristanoj: Maksimiano, Malĥo, Marciano, Dionizio, Johano, Serapiono kaj Konstantino, kiuj tion vidante ege ĉagreniĝis. Ĉar ili estis gravuloj en la palaco, ili, malaprobante oferojn al la idoloj, devis kaŝi sin en siaj domoj kaj prenis tempon por fastado kaj preĝado. Akuzitaj, ili estis starigitaj antaŭ Decio, kaj kiam montriĝis, ke ili estas veraj kristanoj, ili ricevis la eblon resaĝiĝi ĝis Decio revenos. Sed intertempe ili dividis sian patran heredaĵon inter la malriĉuloj, kaj decidis retiriĝi sur la monton Celio. Ili kredis tie esti pli sekuraj. Dum tiel longtempe ili sin tenis kaŝitaj, ĉiam unu

el ili prizorgis la ceterajn, kaj ĉiufoje kiam tiu la urbon eniris, li ŝanĝis sian aspekton per alivestigo al almozulo.

Kiam Decio do revenis en la urbon kaj ilin serĉigis por la oferado, Malĥo, kiu tiam estis la servisto, plentime revenis al la amikoj, kaj rakontis ilin pri la furiozo de la imperiestro. Ili forte ektimis, kaj Malĥo donis al ili la panojn kiujn li alportis, por unue ekmanĝi kaj post plifortigite reiri al la batalo. Post kiam tamen manĝinte ili interparolis en ĉagreno kaj lamentado, laŭ plaĉo de Dio subite ili ekdormis.

Venis la mateno kaj oni serĉis ilin, sed ne povis ilin trovi. Decio tre koleris, ke tiajn junulojn li ne povis retrovi. Oni akuzis ilin, ke ankoraŭ ili kaŝas sin sur la monto Celio kaj dividis sian havaĵon inter la malriĉuloj, kaj ke ili restas ĉe sia konvinkigo. Decio do ordonis, ke iliajn gepatrojn oni alkonduku. Li tiujn minacis je morto, krom se ili rakontos pri ili ĉion, kion ili sciis. Sed ankaŭ ili riproĉis al ili similajn aferojn kaj plendis, ke siajn riĉaĵojn ili disdonis al la malriĉuloj. Tiam li pripensis, kion li

povos fari pri ili, kaj je inspiro de Dio li lasis la aperturon de speleo fermi per ŝtonegoj, por ke tie enŝlositaj ili pereu pro malsato kaj soifo. La servistoj <de la imperiestro> tion faris, kaj du kristanoj, Teodoro kaj Rufino, priskribis ilian martiriĝon, kaj metis la skribaĵon kaŝe inter la ŝtonojn.

La vekigo

Decio delonge jam mortis kaj kun li tiu tuta generacio. Post 372 jaroj, en la 30a jaro de imperiestro Teodozio, ekpululis la herezo de homoj, kiuj neas la resurekton de la mortintoj. Tio ĉagrenigis la plej kristanan imperiestron Teodozio, ĉar li vidis, ke la fido estas minacata malpie. Vestita en mantelo el Kilikia kaproharajo, li retiriĝis en internan ĉambron – dum tagoj li ploradis. Kiam la kompatema Dio tion vidis, li volis konsoli la funebrantojn kaj firmigi la esperon je la resurekto. Li do malfermis la trezor-ĉambron de sia amo kaj vekis la menciitajn martirojn.

La sep dormantoj en manuskripto de la 14-a jarcento.



En la koron de certa civitano de Efezo li metis la deziron, sur tiu monto starigi stalojn por siaj paŝtistoj. Kiam la masonistoj malfermis la speleon, leviĝis la sanktuloj, kaj reciproke salutante sin ili supozis, ke nur unu nokton ili dormis. Memorante la tristecon de la antaŭa tago, ili demandis Malĥon, kiu priservis ilin, kion decidis pri ili Decio. Sed tiu respondis, kion vespere li diris: “Oni ekserĉis nin, por ke ni oferu al la idoloj. Jen kion decidis pri ni la imperiestro.” Respondis Maksimiano: “Kaj scias Dio, ke ni ne oferos.” Fortikiginte siajn amikojn, li ordonis al Malĥo, ke li iru al la urbo aĉeti kelkajn panojn kaj kunportu pli da panoj ol hieraŭ, kaj revenante li sciigu, kion ordonis la imperiestro. Malĥo do prenis kvin monerojn, kaj eliris el la speleo. Kiam la ŝtonojn tie li vidis, li miris, sed kun siaj pensoj aliteme li malmulte pensis pri la ŝtonoj.

Timplena li venis ĉe la urbopordegon, kaj ege miris, ke tie fiksiĝis la krucosigno. Li iris al alia pordo; ankaŭ tie krucosignon li vidis, kaj li ekstreme miris. Poste la krucosignon li vidis super ĉiuj pordoj kaj devis konstati, ke la urbo ŝanĝiĝis. Li faris al si krucosignon kaj reiris al la unua pordo, kaj pensis, ke li sonĝas. Sed certigante sin, li kovris sian vizaĝon kaj iris al la panvendistoj;

ĉie li aŭdis la homojn paroli pri Kristo kaj ankoraŭ pli miris: “Kiel eblas” li diris, “ke hieraŭ neniu kuraĝis menci la nomon de Kristo, kaj nun ĉiuj konfesas Kriston? Mi kredas, ke ĉi tie ne estas la urbo Efezo, ĉar ankaŭ la domoj estas malsame konstruitaj, sed mi alian similan urbon ne konas”.

Kiam li informiĝis kaj aŭdis, ke tio ĉi estas Efezo, li kredis ke li vere freneziĝis kaj volis reiri al siaj amikoj.

La miskompreno

Tamen li iris al la panvendistoj, sed kiam la arĝentajn monerojn li ekprenis, la mirigitaj vendistoj inter si diris, ke ĉi junulo trovis antikvan trezoron. Ĉar Malĥo ilin inter si vidis paroli, li kredis, ke ili volas porti lin al la imperiestro, kaj timigite li petis, ke ili lasu lin foriri kaj retenu panojn kaj monerojn. Sed ili retenis lin kaj diris: “De kie vi estas? Ĉar trezoron de antikvaj imperiestroj vi trovis, montru do al ni, kaj ni estos viaj amikoj kaj ne perfidos vin. Alie vi ja ne povos teni tion kaŝita”.

Malĥo pro timo ne trovis, kion diri. Kiam ili vidis, ke li plu silentas, ili metis al li ŝnuron ĉirkaŭ la kolon, kaj tiris lin meze tra la urbo. Eliris la onidiro al ĉiuj, ke certa junulo trovis trezoron. La amaso kunvenis ĉe li, kaj primiris lin. Li provis klarigi, ke nenion li trovis. Li ĉirkaŭrigardis ĉiujn, sed povis esti rekonata de neniu, rigardante la popolon li volis vidi, ĉu iun li rekonas el la parencoj, pri kiuj li ankoraŭ kredis, ke ili ankoraŭ vivas.

Kiam neniu li trovis, li staris tie kvazaŭ frenezulo meze de la popolo de la urbo.

Kiam tion aŭdis la sankta episkopo Martino, kaj la prokonsulo Antpatro, kiu ĵus alvenis en la urbon, ili ordonis al la civitanoj, ke lin kaj liajn monerojn zorgeme ili konduku al ili. Kiam la servistoj kondukis lin al la preĝejo, li kredis, ke oni venigos lin antaŭ la imperiestron. La episkopo kaj la prokonsulo miregis pri la moneroj kaj pridemandis lin, kie la nekonatan trezoron li trovis. Sed li reagis, ke tute nenion li trovis, sed tiujn monerojn li ricevis de siaj gepatroj. Kiam oni demandis, el kiu urbo li estas, li diris: “Mi bone scias, ke el ĉi tiu urbo mi estas, almenaŭ se tio ĉi estas la urbo Efezo”. La prokonsulo diris: “Alvenigu viajn gepatrojn, por ke ili atestu pri vi”. Kiam li tiujn menciis kaj neniu ilin konis, oni diris, ke li fantazias por iamaniere eskapi. Kaj la prokonsulo diris: “Kiel ni kredu al vi, ke ĉi tio estas mono de viaj gepatroj, se ĝi havas surskribon de antaŭ pli ol tri cent sepdek sep jaroj kaj estas el la unuaj tagoj de imperiestro Decio kaj en nenio similaj al niaj moneroj?”

Kiel viaj gepatroj povus esti de antaŭ tiom da tempo? Sed vi, knabo, vi volas trompi la saĝulojn kaj maljunulojn de Efezo. Tial mi ordonas, ke vi estu leĝe punita, ĝis vi konfesos, kion vi trovis”. Tiam Malĥo antaŭ ili falis surgenuen kaj diris: “Je Dio, sinjoroj, diru al mi, je miaj demandoj, kaj tiam mi malkaŝos, kio estas en mia koro. Imperiestro Decio,

kiu estis en ĉi urbo, kie nun li estas?” La episkopo diris: “Filo, nun surtere imperiestro kiu nomiĝas Decio ne estas. Li estis antaŭ longa tempo”. Malĥo tamen diris: “Pro tio, sinjoro, mi miregas – neniu kredis al mi, sed nun vi simple sekvu min kaj mi montros al vi miajn amikojn, kiuj estas ĉe monto Celio, kaj tiam vi kredu ilin. Ĉar tion mi scias, ke antaŭ la vizaĝo de imperiestro Decio ni fuĝis, kaj hieraŭ vespere mi vidis, ke Decio eniris ĉi urbon, almenaŭ se estas ĉi tio la urbo Efezo”.

La solvo

Tiam la episkopo pensis ĉe si mem, kaj diris al la prokonsulo, ke tio estas miraklo, kiun Dio volas montri en tiu ĉi junulo. Ili do ekiris kun li kaj granda amaso el la urbo kune. Unue Malĥo eniris al siaj amikoj kaj post li la episkopo, kaj li trovis inter la ŝtonoj la skribaĵon kiu estis fermita per du arĝentaj sigeloj. Li laŭtleĝis la tekston al la kunvokita popolo, kaj ĉiuj aŭdis kaj admiris tion. Vidante sidi la sanktulojn en la speleo kun iliaj vizaĝoj kvazaŭ florantaj rozoj, oni falis surgenue kaj gloris Dion. La episkopo kaj la prokonsulo sendis homojn al imperiestro Teodozio, ke tuj li venu kaj spektu la freŝajn miraklojn de Dio. Tiu tuj ekstaris el la cindro kaj sakaĵo, en kiu li lamentadis.

Glorante Dion li venis de Konstantinopolo al Efezo kaj dum ĉiuj iris renkonte al li, kune ili ĉiuj iris al la speleo. Tuj kiam la sanktuloj vidis la imperiestron, ili ekbrilis kaj ilia vizaĝo

estis kiel la suno. La imperiestro eniris, falis antaŭ ilin genuen, gloris Dion, restariĝis kaj brakumis ilin kaj ploris super ĉiu el ili unuope, dirante: “Tiel mi vidas vin, kvazaŭ se mi vidus la Sinjoron, kiu restarigas Lazaron”. Tiam la sankta Maksimiano diris al li: “Kredu al ni, ke pro vi Dio restarigis nin antaŭ la tago de la Granda Resurekto, por ke sendubante vi kredu, ke reala estas la resurekto de la mortintoj. Vere ja ni restariĝis kaj vivas, kaj kiel la infano en la utero de sia patrino ne spertas stimulojn de ekstere kaj vivas, tiel same ankaŭ ni vivis, kuŝis kaj dormis kaj sentis nenion”.

Kaj post ĉi diroj, dum ĉiuj ĝin vidis, ili klinis siajn kapojn teren kaj ekdormiĝis kaj laŭ Dia ordono donis la spiriton. Sed la imperiestro falis sur ilin, ploris kaj kisadis ilin. Kaj orajn tombojn li igis fari, en kiujn ili estu metitaj, kaj tiun saman nokton ili aperis al la imperiestro dirante, ke, same kiel ĝis tiam ili kuŝis en la tero kaj resurektis el la tero, tiel same li lasu ilin ĝis la Sinjoro denove restarigos ilin. Tial la imperiestro ordonis, ke tiu loko estu ornamita per orumitaj ŝtonoj kaj ke ĉiuj episkopoj, kiuj konfesos la resurekton, estu absolvitaj.

Ke laŭdire 372 jarojn ili dormis, povas esti dube, ĉar en la jaro 448 de nia Sinjoro ili resurektis; sed Decio regis nur unu jaron kaj tri monatojn, nome en la jaro 252 de la Sinjoro. Kaj tiel ili dormis nur 196 jarojn.

Nova kaj viva vojo estas inaŭgurita

Mia nuntempa evangelio — Evangelia poemo

Honoré SEBUHORO, Ugando

Post kiam Jesuo mortis kaj fordonis la spiriton,
La vualo de la templo de supre ĝis sube rompiĝis!
Nova kaj viva vojo por ni estis inaŭgurita,
Per la vualo, tio estas la karno de la Oferita!

Li ankaŭ estas, por ni, la Ĉefpastro,
Kiu hodiaŭ ankoraŭ ĉiam preĝas por ni;
Sidi dekstre de la Patro, li intervenas en nia favoro!

Do ne hezitu alproksimiĝi al la trono de graco,
Ni prenu ĉi tiun novan vojon kun humileco kaj aŭdaco!
De nun, neniuj vualoj apartigos nin de la Plejaltulo,
Dankon al la sango de Kristo, danke al la ofero de la Ŝafido!

La pastra preĝo de Jesuo por ni estis respondita,
Repacigo inter ni kaj Lia Patro fariĝis realaĵo:
*“Kiel Vi, Patro, Vi estas en Mi
Kaj kiel mi estas en Vi,
Por ke ankaŭ ili estu en ni.”*[†]
Nova alianco estas proponita al ni.

El ĉi tiu intima rilato kun nia Sinjoro,
El la morto kaj releviĝo de Jesuo Kristo,
Benoj fluas, vera feliĉo!
Ĝuste nun ni gustumu ĉi tiujn delikatajn fruktojn;
Ni promenu sur ĉi tiu nova kaj vigla vojo de hodiaŭ!

[†] Johano 17.21

Festmanĝo kun sopranulino

Ed BORSBOOM, NL

En 1963 okazis en Sofio, la ĉefurbo de Bulgario, la tiujara internacia Esperanto-kongreso. Ĝi logis multajn esperantistojn, ĉar tiutempe la lando estis sufiĉe fermita por ne-komunistoj. Tamen nun la registaro faris escepton kaj enlasis multajn homojn el okcident-Eŭropaj ŝtatoj. Ankaŭ mi el Nederlando kaptis la ŝancon kaj vojaĝis tien.

En la riĉan kongres-programon oni lastmomente enŝovis kabaredan grupon el Pollando. Kiel interesiĝanto de tiu teatra speco mi ankaŭ miksis min inter la aŭskultantojn. Bona decido, ĉar la trupo el tri knaboj kaj unu fraŭlino, ĉiuj inter 20–25 jaroj havis aktualan programon, kiun la kvaropo altnivele prezentis. Ili tiel kaptis min, ke mi ĉe la fino decidis iri al la vesto-ĉambro de la artistoj por rekte diri mian gratulon. Post frapoj sur la pordo la junulino, nomita Mary, aperis kaj aprecis mian komplimenton kaj diris, ke la grupo jam plurfoje ludis en pluraj Esperanto-rondoj, sed neniam ricevis ĉe la fino ajnan dank-esprimon. Sekvis nia adiaŭo. Dum la kongreso mi ne plu vidis ŝin kaj la ceterajn artistojn.

La posta jaro 1964 mi ricevis inviton de varsovia Esperanto-amiko por esti dum semajno en aŭgusto lia gasto. Mi akceptis tion kaj veturis al lia urbo. Bedaŭrinde li ne havis tempon por mon-

tri sian urbon. Sole mi promenis tra Varsovio. Inter alie mi eniris lego-salonon, kie ĵurnaloj el eŭropaj ŝtatoj kuŝis por konsulti. Ĉe iu tablo sidis juna legantino, kiu rigardadis al mi. Subite ni rekonis unu la alian. Estis Mary el Sofio. Kia hazardo! Ni kunsidis kaj parolis kaj parolis. Ŝi inter alie diris, ke estis grava tago, ĉar hieraŭ ŝi akiris la plej altan diplomon pri kantado kaj tuj estis nomumita kiel sopranulino en la opero. Mi proponis tuj festi tion per bankedo en la restoracio Krokodil.

Dum semajno ni kune vagadis tra la urbo. Sed finiĝis la bela tempo. Mi devis rapidi al la stacidomo por kapti la vagonaron al Nederlando. Kia surprizo, ne atendite sur la kajo staris Mary. Ŝi havis tigeon de granda ruĝa rozo en la mano kaj donis ĝin al mi. La vagonaro ekrulis. For Varsovio, for Mary. Subite mi havis la impreson, ke ŝia adiaŭo estis pli ol simpla adiaŭo.

Hejme mi skribis al ŝi. Se ni fariĝos paro, Esperanto estu nia komuna lingvo. Tiukaze vi bezonis serioze lerni ĝin. Komence per niaj leteroj. Tion Mary tute akceptis, nur ŝiaj epistoloj restis plenaj de samaj nekorektaĵoj. Ne helpis plibonigojn. Je ŝia kvina sendaĵo mi kapitulaciis. Kia bedaŭro, kara Mary.

☪

Financa raporto de KELI 2019

(Ĉiuj sumoj en EUR)

**Bilancoj fine de la jaroj
2018 2019****Aktivoj**

Stoko de libroj	4.925,03	4.925,03
Stoko de kasedoj, E-Misio	116,00	116,00
<i>Provizo</i>	<u>5.041,03</u>	<u>5.041,03</u>

Kasista kaso	20,00	840,00
Sekretaria kaso	4.087,00	1.392,00
UEA-konto kelk-p	27.146,20	27.163,05
Ĝir-konto, CIC-banko	1.383,57	450,82
Ŝpar-konto, CIC -banko	<u>26.529,29</u>	<u>22.793,21</u>
<i>Monrimedoj</i>	<u>59.166,06</u>	<u>52.639,08</u>

Sumo de aktivoj 64.207,09 57.680,11**Pasivoj**

Kapitalo	19.591,96	21.564,18
Rezulto de la jaro	1.972,22	-3.136,15
<i>Kapitalo entute</i>	<u>21.564,18</u>	<u>18.428,03</u>

Dumvivaj membroj	1.886,50	1.768,50
E-Misio	6.894,51	6.894,51
Helpa kaso	1.850,08	1.020,08
Kongresa rezerva kaso	1.823,48	823,48
Literatura/Himnara kaso	12.941,57	12.941,57
Heredaĵo de Pamela Jackson	11.161,44	11.161,44
Mondonaco de K.U.N.E.	<u>4.000,00</u>	<u>4.000,00</u>
<i>Fondusoj entute</i>	<u>40.557,58</u>	<u>38.609,58</u>

Kreditoroj	1.176,00	0,00
Evidente	696,83	590,00
KELI-abonoj de EK	12,50	12,50
Kongresaj kotizoj	<u>200,00</u>	<u>40,00</u>
<i>Transitaĵoj kaj pasivoj</i>	<u>2.085,33</u>	<u>642,50</u>

Sumo de pasivoj 64.207,09 57.680,11

Klarigoj kaj rimarkoj pri la bilanco 2019.12.31

Aktivoj

Stokoj

En la jaro 2019 ne ŝanĝiĝis la stoko de libroj aŭ kasedoj. Nova inventuro kaj donacado al malriĉaj, nepagipovaj landoj estas decidita.

Monrimedoj

Kasista kaso estas ĉe Ágnes Ráczkevy-Eötvös (HU), kutime kun malalta sumo. Sekretaria kaso estas ĉe Pavel Polnický (CZ), kiu zorgas pri la presado kaj dissendado de Dia Regno.

KELI havas bankkontojn ĉe UEA (kelk-p) kaj ĉe franca CIC-banko (ĝir- kaj ŝparkonto).

Pasivoj

Kapitalo

Kapitalo enhavas la sumigitan rezulton de la antaŭaj jaroj. La rezulto de la jaro 2018 estis bedaŭrinde: -3.136,15 Eŭroj.

Fondusoj

Laŭ la decido de la estraro Dumvivaj membroj, E-Misio, Helpa kaso, Kongresa rezerva kaso kaj Literatura/Himnara kaso estas aparte montritaj. El Helpa kaso kaj el Kongresa rezerva kaso estraro decidis mil-mil Eŭrojn mon-apogon al la kongreso, kiu pro la malmultaj partoprenantoj havis malprofiton.

En 2017 KELI ricevis heredaĵon (11.161,44 Eŭrojn) kaj mondonacon de la nederlanda sekcio de KELI (4.000 Eŭrojn). Pri la uzado de tiuj sumoj ankoraŭ ne okazis decido.

Transitaĵoj kaj pasivoj

En la jaro 2019, kiel en ĉiuj jaroj, KELI-anoj kolektis monon al la fonduso Stichting Zienderogen (antaŭa Evidente). KELI-anoj mendas la gazeton Espero Katolika tra la konto de kelk-p. Ĉiuj tiuj sumoj jam estas transkontigitaj.

La kongresaj kotizoj estas la antaŭpagitaj aliĝ- kaj kongreskotizoj, kiuj alvenis rekte al la bankkonto de KELI kaj estos ĝirataj al LKK.

Rezulto 2019 kaj buĝetoj 2019, 2020 kaj 2021 (Ĉiuj sumoj en EUR)

	Buĝeto 2019	Rezulto 2019	Buĝeto 2020	Buĝeto 2021
Enspezoj				
Kotizoj/Abonoj	2.000	1.767,00	2.000	2.000
Kotiz- kaj kursdiferencoj	0	0,00	0	0
Adopta Kaso	300	169,09	300	300
<i>Kotizoj entute</i>	<u>2.300</u>	<u>1.936,09</u>	<u>2.300</u>	<u>2.300</u>
Librovendado	50	129,79	50	50
Rentumoj	150	63,92	150	150
Profito el kongreso	200	0,00	200	200
<i>Aliaj enspezoj</i>	<u>400</u>	<u>193,71</u>	<u>400</u>	<u>400</u>
Enspezoj entute	2.700	2.129,80	2.700	2.700
Elspezoj				
Presisto + sendado de DR	2.600	2.895,00	2.600	2.600
Perantoj	0	0,00	0	0
<i>Revuokostoj</i>	<u>2.600</u>	<u>2.895,00</u>	<u>2.600</u>	<u>2.600</u>
Prezidanto	20	20,00	20	20
Sekretario	70	70,00	70	70
Redaktoro	150	150,00	150	150
Kasisto/Matrikulisto	20	20,00	20	20
<i>Estrarkostoj</i>	<u>260</u>	<u>260,00</u>	<u>260</u>	<u>260</u>
UEA-kotizo	65	44,00	65	65
Bankkostoj	150	62,75	150	150
Merituloj	50	130,00	50	50
UK Lukostoj	50	40,00	50	50
<i>Generalaj kostoj</i>	<u>315</u>	<u>276,75</u>	<u>315</u>	<u>315</u>
Librovendado (kostoj)	10	0,00	10	10
Varbado (Inf./varba kaso)	10	0,00	10	10
Malprofito de la kongreso		1.830,00		
Rabatoj de perantoj	5	4,20	5	5
<i>Aliaj elspezoj</i>	<u>25</u>	<u>1.834,20</u>	<u>25</u>	<u>25</u>
Elspezoj entute	3.200	5.265,95	3.200	3.200
Saldoj	-500	-3.136,15	-500	-500

Klarigoj kaj rimarkoj pri la Rezulto 2019 kaj la Buĝetoj 2020/2021

Enspezoj

Kotizoj

La Kotizoj en 2019 estis iom pli malaltaj ol planitaj.

Bedaŭrinde ankaŭ al la Adopta kaso pli malmultaj mondonacoj alvenis ol ni esperis. La Adopta kaso estas mondonacoj de la KELI-membraro por membroj, kiuj ne povas pagi la kotizojn aŭ nur parte. Ili estas petataj kontribui „laŭforte”. Koregan dankon al ĉiuj donacintoj kaj donacontoj.

Aliaj enspezoj

Pli da librovendado okazis en 2019, dank'al Jerald Veit, kiu komencis zorgi pri la Biblio-vendado en Usono. La rentumoj estis pli malaltaj, ol ni planis.

Elspezoj

Revuokostoj

La kostoj de Dia Regno enhavas kaj la presadon kaj la dissendadon.

Estrarkostoj

En 2019 la kostoj estis la planitaj sumoj.

Ĝeneralaj kostoj

En tiu ĉi kategorio en la jaro 2019 estis la UEA-kotizoj kaj la Bankkostoj.

La kategorio de Merituloj enhavis monoferon al la memoro de Éva Farkas-Tatár kaj donacon al LKK. Ni ankaŭ en 2019 luis salonon dum UK (104a en Lahtio, Finnlando).

Aliaj elspezoj

Aliaj elspezoj estis la bedaŭrinda alta malprofito de la kongreso.

Ni ankaŭ pagis makleraĵon al la brazila peranto de Dia Regno.

Saldoj

La saldo de la jaro 2019 estis bedaŭrinde negativa: - 3.136,15 Eŭroj.

Kaj la enspezoj estis pli malaltaj, kaj elspezoj estis pli altaj ol ni planis.

Espereble la sekvontaj jaroj estos ekonomie pli bonaj.

La financa bazo de KELI daŭre estas sufiĉe kontentiga.

Buĝetoj

La Buĝetoj de la jaroj 2020 kaj 2021 tamen enhavas modestan negativan rezulton.

Ni daŭre estas optimismaj, kaj ni kredas ke la membraro de KELI daŭre subtenos nian ligon.

Tagordo por la jarkunveno de KELI 2020

- 1 Malfermo
- 2 Elekto de kunprotokolantoj
- 3 Akcepto de la tagordo
- 4 Komunikoj
- 5 Funebra memorigo
- 6 Sekretaria jarraporto
- 7 Kasista jarraporto
- 8 Raporto de la kaskontrolantoj
- 9 Diskuto kaj akcepto de la raporto
- 10 Buĝetoj
- 11 Raporto de la redaktoro
- 12 Estrarelekto
- 13 Kongresplanoj – 2021
- 14 Proponoj kaj sugestoj de la membroj
- 15 Fermo

Klarigoj:

(12) Ĉi-jare finiĝas la 3-jara deĵorperiodo de Václav Pospíšil, Pavel Polnický, Siegfried Krüger kaj Ágnes Ráczkevy-Eötvös. Ĉiuj estas reelekteblaj.

(13) Propono pri la KELI-kongreso 2021 ne alvenis

Rimarko 1:

Se ne povos okazi ĉi-jare kongreso en Legnica, ni petas vin, kiu estas membro, ke vi skribu letere aŭ retmesaĝe al sekretario Pavel Polnický, ĉu vi konsentas kun plilongigo de la deĵorperiodo de kvar estraranoj (vidu klarigon al la punkto 12 supre) ĝis la venontjara kongreso en 2021. La adresojn de la sekretario vi trovas sur paĝo 50.

Rimarko 2:

Ĉu vi jam pagis vian membrecon kaj abonon de Dia Regno por la jaro 2020?

Pavel Polnický
sekretario

Spuroj sur la sablo

Tradukis Rejhaneh

En marborda vilaĝo, iu viro, fidanta Dion, kun sia edzino kaj sia filo loĝis en malgranda domo apud sia bieno.

La tagoj pasis ĝoje kaj ĉiun tagon post taga laboro, li iris sunsubire al la plaĝo kaj sur la sablo marŝis kaj parolis al Dio. Kiam li rigardis malantaŭen, li vidis du liniojn da spuroj sur la sablo: unu estis la propraj spuroj kaj la alia linio estis la spuroj de Dio.



Hansueli Krapf
Wikipedia (en)
(CC BY-SA 3.0)
lom prilaborita

Venis epoko kiam lia vivo ŝanĝiĝis. Li perdis sian edzinon kaj sian filon kaj sian bienon, kaj lia vivo estis malfacila.

Li ankoraŭ iris al la plaĝo ĉiun tagon sunsubire kaj parolis al Dio. Sed ĉi-foje kiam li rigardis malantaŭen, li vidis nur unu linion da spuroj sur la sablo: "estis liaj propraj spuroj".

Kaj iun tagon, li kriegis pro malĝojo: "Sinjoro, kie vi estas? Kial vi lasas min sola?"

En tiu nokto, li vidis la Sinjoron en sonĝo kaj li diris al la Sinjoro: "Kie vi estas? Kial vi lasas min sola? Kial vi estis kun mi en tiuj bonaj tagoj, sed hodiaŭ kiam mi bezonas vin, vi ne plu estas kun mi?"

Kaj Dio diris al li: "Kiel vi scias, ke mi lasis vin sola?"

Li respondis al Dio: "Ĉar en tiuj tagoj kiam mi marŝis sur la plaĝo kaj mi parolis al vi, mi vidis malantaŭ mi du liniojn da spuroj sur la sablo, unu estis la mia kaj la alia linio estis viaj spuroj, sed ĉi-tiujn tagojn, kiam mi rigardas malantaŭen, mi vidas nur unu linion da spuroj, kiu estas la mia, kaj la via ne estas." Dio diris al li: "Ne eraru! Ili estas miaj spuroj, ne la viaj. En ĉi-tiuj tagoj, mi metis vin sur miajn ŝultrojn!"

☪



Chrisatki03 /Wikipedia (en)
(CC BY-SA 4.0)

Kronviruso, Kovim-19 kaj ni!

En la reta diskutgrupo *diaregno@yahoogroupes.fr* mi sendis jenan mesaĝon: "Estus interese ekscii, kaj mi supozas ankaŭ legantoj de nia revuo Dia Regno ŝatus ekscii, kion vi faras, kiel vi fartas, kiel vi uzas la tempon ktp. dum la pandemio kaj ebla kvaranteno. Ĉu vi legas pli da (esperantaj) libroj aŭ vidas jutubajn (esperanto)-filmetojn? Ĉu vi parolas rete pere de Skajpo/Zoom/Facetime kun geamikoj/parencoj? Ĉu vi volontulas por helpi maljunulojn?". Jen kelkaj respondoj. /Redaktoro

Kara redaktoro,
vere estas strangaj tempoj, pli strange ol iam antaŭe mi spertis.

Mi Gerrit sufiĉe regule biciklas kun mia edzino por ekzerci la muskolojn po duonhoro – pli longe fizike ne eblas; krome hejme mi multe legas – kiel kutime – kaj trakorektas presprovaĵojn el LA APOSTOLAJ PATROJ, do mia vivritmo ne serioze ŝanĝiĝis, krom ke –tre ĝene – al ni ĉefe mankas la semajnaj diservoj, precipe ĉirkaŭ pasinta Pasko-semajno. Mi ankaŭ regule plu tradukas el la Greka – el amiko Lukiano: kia mirinda aŭtoro! Ankaŭ ree logas min tradukado el samtempulo de Jesuo, Greklingva Judo, Filono el Aleksandrio – Pri la Kreo de la Mondo.

Gerrit Berveling

Kara redaktoro,
mi absolute ne enuiĝas. Mi estas sekretariino de la loka eklezia komunumo, kaj ankaŭ nun estas sufiĉe da laboro. Por "kunveni" ni kelkfoje skajpas; tre malofte mi uzas "Zoom:on" aŭ "Jitsi:on". Cetere mi ŝategas legi, do, homo leganta ne konas enuon. Ĉar mia edzo Gerrit, tute ne ŝatas sporti, ni preskaŭ ĉiun tagon biciklas ien tien.

Multaj organizoj sendas daŭre belajn tekstojn, film(et)ojn ktp, fakte tro multe por vidi aŭ legi ilin. Do, ni fartas relative bone en tiuj strangaj cirkonstancoj.

Kore,
Madzy van der Kooij

Saluton ege kara!

Kio nova ĉe vi? Kiam vi estos liberigita de la izoleco? Ĉi tie, ekde la 11a de majo 2020, ni ĉiuj estos ekstere kaj ekas niajn kutimajn aktivaĵojn. Komprenu ke ni ĉiam restas hejme sen promeni grupe ekstere, eĉ iri en ekleziojn, lernejojn, ... Ni ne rajtas fari laboron amase, eĉ la edziĝfesto ne estas permesata.

Ĉion bonan! Frate via amiko
Honoré Sebuĥoro

Saluton kara,

Ja, antaŭnelonge ni ne babilis pro tiu pandemia fenomeno kiu skuis/as la tutmondon. Ni esperu ke iam ĝi malaperos. Komprenu, estas ĝenerale tikla afero nuntempe. Kiel la registaro agas pri aŭ kontraŭ ĝi? Ĉu oni restos hejme ĝis kiam ne estos laboro? Laŭ mi, rimarkiga ke ni jam estas en la tria monda milito pri ekonomio. Komprenu bone, kiam la lando ne permesas la iro/reiron de avidialoj por vendi varojn eksterlande ĉu eblas enspezi? Ne eblas! Kiel la lando havu enspezojn? Do, la pandemio kaŭzas al la popolo malsaton kaj morton.

Nun, kiam la ŝtato permesos la funkciadon de poŝtoŝtupoj ĉe vi?

Esperu kaj zorgu pri via familio respektante ĉiujn higienajn kondiĉojn donitajn de la registaro!

Estu forta! Ĉion bonan!
Honoré Sebhoro

Kara redaktoro,

nu, plejparte mi enuiĝas! Kutime mi laboras en tri volontulaj postenoj, sed nun ĉiuj restas fermitaj ĝis paso de la viruso. Pro tio mi havas tre multe da "libera" tempo. Tamen mi faras kelkajn bonajn okupojn. Ekzemple, mi komencis retan kurson pri la hispana lingvo, mi multe legas en la Biblio kaj en aliaj libroj, mi preĝas multe pli ol kutime, mi aŭskultas kaj ludas muzikon (sur klavaro), fojfoje mi malesperas, sed entute mi kaj mia familio restas sanaj, danke al Dio. Kaj finfine mi eltrovis, kiel ĝuste tajpi la Esperantajn literojn sur mia komputilo!

Kaj jen versiklo, kiu aparte frapis min dum mia legado de la Biblio:

Ĉar vi observis la vorton de mia pacienco, mi ankaŭ vin konservos el tiu horo de provo, kiu venos sur la tutan mondon, por provi la loĝantojn sur la tero (Apokalipso 3:10).

Al ĉiuj mi deziras pacon kaj bonan sanon. Eltenu!

Amike via,
Jerald Veit

Estimataj uzantoj de la listo, ĝojigis min viaj vivosignoj.

Ĉu ni vere jam transvivis la pandemion? Hieraŭ [24a aprilo] mi aŭdis pri 50 000 mortintoj en Usono. Ĉe ni kontaktoj kun personoj estas limigitaj kaj ek de lundo mi povas aĉeti en vendejo nur per protektilo antaŭ buŝo kaj nazo (masko-devo). Mi estas certa, ke la KELI-kongreso ne povos okazi!

Restu sanaj kaj gardataj! Tion salutante deziras
Siegfried Krüger

Ho Di', ho bona Di'

O GOTT, DU FROMMER GOTT

VI
1. Ho Di', ho bo - na Di', de l' bo - no Vi la fon - to!
Sen Vi, ho Di', ne - ni', kun Vi la tu - ta mon - do.

Mi pe - tas Vin pri san' de kor - po kaj a - nim',

pri pu - ra kon - sci - enc', pri a - ma kor - in - tim'.

O GOTT, DU FROMMER GOTT • EG 495.1-6 (T) • duvoĉa Mi:
Albrecht Kronenberger 2020 • germana T: Johann Heermann 1630 •
E: Christa Kofß / Albrecht Kronenberger 2020-03-23 • strofoj 7 - 8 ne
tradukitaj • instrumenta akompano: Ernst Leuze 2020-03-25

- | | |
|---|--|
| <p>2. Ho, ke kun diligent' / plenumu mi la devon
laŭ Via ord' kaj vol'! / Mi petas Vian benon.
Sukceson donu Vi / al ĉiu mia far'.
Mi je konvena temp' / ĝin faru, sen erar'.</p> | <p>La malamikon mi / superu per humil'.
Ne manku en bezon' / al mi, ho Di', konsil'.</p> |
| <p>3. Ho, ke parolu mi / konvinke, konvinkite,
neniam sen util', / sed ĉiam trafe, sprite!
Emfazon donu Vi / al mia enda vort',
por ke tra mia dir' / efiku Via fort'.</p> | <p>5. Ho, ke kunvivu mi / kun ĉiu hom' en paco,
en Kristo amu lin, / kaj helpu lin sen laco!
Se plezurigas min / posedo, mon', havaĵ',
mi petas, ke en ĝi / ne estu malĝustaj'.</p> |
| <p>4. Ho, ke mi kun kuraĝ' / defiu al danĝeroj!
Neni' subigu min, / nek kruco nek suferoj.</p> | <p>6. Kaj pasos jar' post jar' / kun peno kaj doloro.
Griziĝos la harar', / kaj svenos la fervoro.
Ho, ke oldiĝu mi / en digno kaj honor',
ĝis post la lasta hor' / mi vidos Vin en glor'.</p> |